

Flandra ESPERANTISTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN - PROPAGANDA

Verschijnt maandelijks
Vijftiende jaargang
N u m m e r 4 (166)
A P R I L 1948

Vertegenwoordiger in Nederland :
NEDERLANDA ESPERANTO-CENTRO
Huygensstr. 17 B., Rotterdam-W.
Postrekening 514366 van J.C.J. Ham.

Orgaan van de
VLAAMSE ESPERANTISTEN-BOND
POSTBUS 342, BRUSSEL
Postrekening 2321.50 van V. E. B.

LIDGELDEN :
* Leden : 75 fr.
* Steunleden : min. 150 fr.
Inwonende leden : 25 fr.
(* met bondsorgaan)

ABONNEMENTEN :
België : 60 fr.
Nederland : 4 fl.
Ceteraj landoj : 75 bfr.
Proefn. : 5 fr. (1 r.k.)

Ni briligu nion stelon.

Rimarkinde estas ke pluraj el niaj gazetoj lastempe prezentis al siaj legantoj meditojn pri la renovigo de niaj propagandaj rimedoj kaj revigligo de niaj metodoj.

Ĉiuj senescepte atentigas pri la neceso akcenti la praktikan uzon de Esperanto; ĉi tie mem, S-ro Cortvriendt skribis pasintjare: « Racion argumentadon kaj precipe racion aplikadon de Esperanto ni bezonas por konvinki pri la taŭgeco de nia afero terure praktikan mondon. »

Fakte en ĉi tio la individuaj esperantistoj ĝenerale neglektas sian devon. Vane niaj revuoj petas sendadon de leteroj al radiostacioj aŭ ĵurnaloj, kiuj inkludas definitive enkonduki verdan rubrikon. Sajne la sorto malfavoras tiujn klopodojn. Esperantistoj estas kelkfoje mallaboremuloj, kies inertecon oni ne facile povas forskui. S-ro Justus Merks, radio-redaktoro de *Espero Katolika*, provis fari ĝin, en 1946, per artikolserio titolita « Tuj skribu al... »; sed la eldonisto devis, pro lokomanko, dispecigi ĝin kaj poste ĉesigi ĝian publikigon...

Cetere, oni ne sufiĉe konscias, ke praktika aplikado povas grandparte eliri de ni mem, ke la unua kiun ni devas konvinki pri neceso de PLENA uzado de nia de nia Lingvo estas NIA PROPRA PERSONO! Kiom da okazoj pasas, kiujn ni ne kaptas, pri kies valoro ni eĉ ne pensas. Kiom da fojoj, ankaŭ, ni ne aŭdacas montri nian esperantisticon! Kiom da vendistoj troviĝas en niaj vicoj, kiuj ne fiksis sur sian pordon ŝildeton kun teksto *Esperanto parolata*. (Amika vendistino rakontis al ni ke ŝi spertis kiel mirefika propagandilo tio estas!) (*) Kiom da samideanoj-ĵurnalistoj, kiom da profesoroj, kiuj neniam parolas pri nia Afero, aŭ nur tre malofte kaj mallaŭte... Kiom da membroj, eĉ aktivaj, kiuj ne portas insignon, kiuj parolas pri sia gazeto, sed ne pri sia esperantista gazeto, pri libroj legitaj aŭ legindaj, sed ne pri esperantlingvaj libroj!

Kio estas la rezulto? S-ano I. Zálupsky notis ĝin en *Esperantisto Slovaka* (Julio 1947): « Preskaŭ en ĉiu urbo vivas almenaŭ unu esperantisto, en multaj ni havas esperantajn rondojn, klubojn, ktp. Sed ĉu fremda esperantisto, alveninta en niajn urbojn, povus rimarki tion? Plejparte ne, ĉar ni ne estas ornamitaj per verda steleto, ni ne havas afiŝkestetojn, esperantajn surskribojn en la stratoj, ktp. Kune kun ni en niaj urboj vivas homoj kiuj eĉ ne aŭdis pri Esperanto. Estas ĉio nia kulpo! »

Sendube ni tro malofte parolas PRI Esperanto. Ne kompleté malpravas la kontraŭuloj kiuj mokas nian movadon, komparante ĝin al sekreta societo. En tro multaj lokoj niaj grupoj efektive aspektas tiaj.

Eĉ ne malofte okazas ke iu kiu lernis nian Lingvon, poste ne plu okupiĝas pri ĝi, ne ĉar ĝi nun ne utilas por li, sed ĉar li « neniam ion rimarkas pri Esperanto » kaj el tio konkludas ke ĝi neniam utilos por iu ajn.

En tiaj cirkonstancoj, kiel estus eble konvinki indiferentulojn? Ĉu ne multaj personoj miras kiam ili vidas bele eldonitan esperantan revuon? Ĉu multaj ne pensas ke nia literaturo konsistas nur el 24- aŭ 32-paĝaj propagandaj broŝuroj, el poŝvortaretoj kaj lernolibroj

kiuj konigas la lingvon en kvin aŭ dek lecionoj?

Refoje, kio estas la rezulto?
« La tuta esperantista movado ne estas sufiĉe vigla kaj viva. Estus envere tempo ke ni pripensu la kaŭzojn kaj plibonigu la situacion » Tiel prave opinias *La Voĉo de Izraelo*, lerta kaj entuziasma gazeto, kiu povus bone servi nian Aferon, se ĝi pli ofte pritraktus tiajn temojn prefere al novspeca rasismo, kiu nur povas alporti pilajn suferojn al la Homaro.

Ĉiukaze Flandra Ligo, post plurjara organiza laboro, definitive komencis grandskalan agadon, kies celo estas « atentigi milojn da homoj pri Esperanto ». Nia vigla ligestraro komprenis ke la moderna homo konsistas « el papero kaj celulo » (kiel diris F. Morlion) kaj konsekvence planas vastan propagandon per gazetoj kaj filmo.

Precipe la pergazeta agado gravas. (S-ro Marc Delforge, profesoro de ĵurnalismo en la Lovena Universitato, citis al ni, antaŭ nelonge, amerikajn statistikojn kiuj pruvas ke gazeta reklamo restas pli efika ol la radia kaj filma.) Kaj precipe en tio la individua ligano povas apogi la agadon de la ligestraro. La redakcioj ŝatas scii kion deziras la legantoj kaj abonantoj; kial do la esperantistoj hezitas esprimi al sia taggazeto deziron pri verda kroniko?

Do, ĉiam ankaŭ necesas individua agado. Ĉiu plenumu sian rolon. Ĉiu pensu kaj agu. Neniu metodo estas malbona, se nur ĝi iel efikas.

Heroldo lastempe publikigis fotografiojn pri samideanoj kiuj ornamis biciklon aŭ aŭtomobilon per esperantaj surskriboj. Tiu maniero povus ŝajni ridinda; ĝi certe ne estas tia. Ĉiun reklamon karakterizas iu naiveco, iu infaneco; sed ĉu la plej gravaj kaj vivnecesaj homaj agoj ne estas tiaj? Ĉu *Puech* ne parolis pri « ludoj » de la Amo samkiel de la Politiko? Iugrade ni devas en ĉio spiti la ridindecon.

Ni finfine konsciu ke timema aŭ mallaŭta voĉo ne plu estas aŭdebla en la hodiaŭa bruema mondo. Eĉ la filmproduktantoj el *Hollywood* imagas ĉion ajn por « briligi siajn stelojn ». Urgas ke ankaŭ ni briligu la nian...

Fernand PIOT.

(*) La nomitaj plaĉaspektaj emajlaj ŝildetoj estas haveblaj ĉe F.E.I. je 12 Fr.

P.S. La februara numero de *La Voĉo de Izraelo*, organo de la tutmonda hebrea esperantista movado, (eldonata en Bruselo), kolere atakas F.E. pro du artikoloj, kiujn ĝi aperigis pasintjare kaj redaktis resp. Eco kaj ni mem. Ĝi skribas i.a.: « Ni volas altiri la atenton de niaj samideanoj al tio, ke ekzistas esperantistoj kiuj volas uzi la internacian lingvon al celoj malpuraj kaj danĝeraj. Ili estas ankoraŭ pli danĝeraj, ĉar diabloj venas sub maskoj de anĝeloj. » Sekvas akuzoj pri germanemo, hipokriteco, k.s.

Ĉio tio... ĉar ni aŭdacis malkonsenti kun la ostracismo kiun jetis kelkaj judaj samideanoj sur la germanajn esperantistojn.

Izraelo nuntempe luktas por sendependeco. Ni komprenis ke nun, eĉ malpli ol en septembro 1946 (kiam aperis la manifesto de la juda-pola samideano), ĝi kapablas objektive konsideri la pridiskutatan problemon. Sed tio ne estas kialo por ke aliaj ne rajtu pli serene pritrakti ĝin.

DE LEEK ZEGT...

maar de wetenschap antwoordt

Gemakkelijk te weerleggen zijn argumenten als: « Ieder volk zal de kunsttaal op zijn eigen manier uitspreken » of: « Ieder individu zal de zegswijzen van zijn eigen taal overbrengen in de kunsttaal » of: « Een algemeen ingevoerde kunsttaal zou binnen korte tijd uiteenvallen in sterk gedifferentieerde dialecten ». Over de waarde van de beide eerste argumenten kan men oordelen aan de hand van de praktijk... Hierbij is gebleken, dat inderdaad vooral degenen, die niet gewend zijn vreemde talen te gebruiken, een nationaal gekleurde uitspraak geven aan de kunsttaal. Dit is echter niet verontrustend, daar de verstaanbaarheid er niet of nauwelijks door wordt beïnvloed. Bovendien heeft mondeling internationaal verkeer blijkens de ervaring een spoedige verbetering van de uitspraak ten gevolge. Overigens geldt het geopperde bezwaar ook voor de nationale talen die als verkeerstaal gebruikt worden. Een Nederlander spreekt het Engels anders uit dan een Fransman of een Japannees, en toch kan het Engels tussen hen als verkeerstaal gebruikt worden. De kunsttaal heeft echter dit vóór op de nationale talen, dat ze gecompliceerde klanken en moeilijke klankverbindingen kan vermijden, en dus in het algemeen gemakkelijker uit te spreken is.

Ook het bezwaar, dat iedere spreker geneigd is typische zegswijzen en syntactische constructies in de kunsttaal over te brengen, is niet geheel ongegrond... Maar ook hier geldt weer, dat deze moeilijkheden even zeer optreden, wanneer men in plaats van de kunsttaal een vreemde nationale taal gebruikt. Ook zijn de bezwaren minder ernstig dan men op het eerste oog zou denken. Echt idiomatische uitdrukkingen, die voor een vreemdling onverststaanbaar zijn, vermijdt ook de onervarene instinctief... Wie weinig ervaring heeft in gebruik van de kunsttaal, en ook overigens niet gewend is om te gaan met vreemde talen, zal aanvankelijk geneigd zijn om de constructies van zijn moedertaal woordelijk te vertalen, daar ze hem normaal toeschijnen. Maar ook hier geldt weer, dat men bij veelvuldig gebruik van de kunsttaal spoedig leert op zijn hoede te zijn voor wendingen, die aanleiding tot misverstand kunnen geven...

De bewering dat de kunsttaal, wanneer ze eenmaal algemeen ingevoerd zou zijn, in verschillende dialecten uiteen zou moeten vallen, is door niets te motiveren. Iets anders zou het zijn, wanneer de kunsttaal in de plaats zou treden van de nationale talen, en dus moedertaal zou worden. Maar zelfs dan zou van dialektvorming waarschijnlijk slechts sprake zijn in afgelegen gebieden, die weinig contact met de overige wereld zouden onderhouden. Een hulptaal, die enkel met vreemdelingen gesproken wordt, en die men dus steeds zal trachten zo nauwkeurig mogelijk uit te spreken, kan zich nooit van streek tot streek zelfstandig ontwikkelen. Integendeel zal de uniformiteit in het gebruik ervan steeds groter worden, te meer, daar ze zowel voor mondeling verkeer als voor schriftelijk gebruik toepassing zal vinden.

Dr. W. J. A. Manders
« Vijf Kunsttalen »

Izraelo hurlas, ĝi ne rezonas.
Ĝi ne objektive rezonas; ĝi hurlas pasie.

Pasio blindigas: S-ro Rusak ne vidis ke Eco parolis ankaŭ pri kontraŭjudaj pogromoj; li ne vidis ke ni ankaŭ parolis pri misero en ĉinujo.

Kiam ĉiuj vunditoj estos resaniĝintaj, ankaŭ la hebrea esperantista movado plisereniĝos.

Sed kio pleje mirigas nin, estas la malmodernaj kaj personaj insultoj kiujn adresis al ni *La Voĉo de Izraelo*. Ĉu la domo de S-ro Rusak Henoch ne plu estas « domo de esperantistoj », sed nur « domo por la en-ĉio-samopiniantaj esperantistoj »?

† Mohandas Gandhi



Op 30 Januari laatstleden viel te Nieuw Delhi onder moordenaarshand, slachtoffer van blinde haat, Mahatma (Mahatma = grote ziel) Gandhi, een nobel mens, een verheven geest en een goed vriend en warm voorstander van Esperanto.

Gandhi had voornamelijk een diepe verering voor de auteur van het Esperanto. De menslievende betrachtingen die Dr. Zamenhof tot het construeren van zijn internationale taal hadden gebracht, schatte de Indische leider bijzonder hoog.

Het gebeurde dat hij, na de gebruikelijke gebeden uit het Heilig Boek der Indiërs, het « Bhagavad Gita », samen met zijn discipelen een strofe van Zamenhof's « Preĝo sub la Verda Standardo » (Gebed onder de Groene Vlag) reciteerde:

Tot U heimnisvolle, almachtige zonne, O Geest, die de wereld doorzweeft, Tot U liefdevolle, waarachtige bronne, Die 't leven bestendig en geeft, Tot U, dien zich allen verschillend verbeelden, Maar nimmer aan 't eigene harte verheelden, O scheppende, o alomheersende Kracht, Nu bidden wij zacht.

Niet met het geloof van ons land wij U naken, Door hartstocht verblind en verstarde, En elken godsdienstigen wrok wij nu wraken: Nu heerst het geloof van het hart. 't Is dat wat wij allen gelijkelijk voelen, Het waarste waarmee zonder vechtende woelen, Als zonen der mensheid, wij nu onvervaard, Naar U staan geschaard.

Eens schiept Gij het mensdom volmaakt naar uw wezen, Maar 't heeft zich gespleten in haat, En volk tegen volk is in wreedheid gerezen, Een broeder zijn broeder verslaat. O wie Gij ook zijt in uw heimnisvol gloten, Wij smeken U, wil onze bede aanhoren: Schenk weerom den vrede, zo innig betracht, Aan 't mensengeslacht!

Zamenhof, Gandhi: twee onsterfelijke figuren uit het Parthenon van de menselijkheid!

E.C.

Radio-Vieno

Novaj sendo-horoj (mez-eŭr. tempo) per stacio Wien I, 506.8 m. kaj, krome, marde: 31 kaj 41 m.)

Marde: 18.00-18.05 h-germanlingvaj informoj pri la E. movado; 18.05-18.10 h. — E. parolado pri Aŭstrujo. *Merkredo*: 6.35-6.45 h. — E. kurso por germanlingvanoj.

OBSERVOJ

LA KISO.

En unu el la ĉefaj Esperanto-gazetoj mi legis kun miro, ke la anoj de Reĝa Belga Ligo parolas kun naŭzo pri la anoj de Flandra Ligo. Ĉu kun naŭzo? Mi ne kredas



tion, la esprimo estas tro forta. Cetere, konsiderante ke «noblesse oblige» kaj ke la anoj de Reĝa Belga Ligo ĉiuj estas tre imponaj sinjoroj kaj tre respektindaj sinjorinoj, kies aĝo devigas al respekto kaj kiuj pro longa vivpraktiko kapablas moderigi siajn esprimojn, ni korektu: kun ioma indigno.

Iel kiel la avĉjo, kiu kun malplaĉo konstatare ke la vigla nepo ne sekvas precize la vojon elektitan antaŭ duona jarcento. Kaj ni komprenas tion. Ni eĉ konscias nian krimon: adapti la organizon de la Esperanto-movado en Belgujo al la dumacieco de la lando, unstate perforti la naturon klopodante la inversion. Ni eĉ esperas ke la bona avĉjo iam grumblyante konfesos: dammita bubo, konsiderante la rezulton, mi fine devas agnoski ke vi tamen pravas.

Tiam ni respektplene kisas lian frunton. Dio, ni ne estas kanibaloj!

PIK.

NEDERLANDSE FILMS IN ESPERANTO.

Het Nederlands Ministerie voor Wederopbouw liet drie films over de wederopbouw van Nederland in het Esperanto na-synchroniseren voor de propaganda in het buitenland.

De drie films handelen over: «De Terugkeer» (film over de terugkeer van de geëvacueerde inwoners van de stad Arnhem); «Walcheren» (over het herstellen van de zeedijk van het eiland Walcheren); «Vernietigd Land» (over het naoorlogs uitzicht van Nederland en de inspanning voor de wederopbouw).

Na een officiële voorstelling in Den Haag werden deze stroken naar vrijwel alle landen verzonden.

ESPERANTO-SPREKENDE FILM OVER BUDAPEST.

Het bestuur van de Hongaarse hoofdstad liet een film vervaardigen «Budapest herleeft!» Het Esperanto-commentaar is van de gekende Esperanto-auteur, J. Baghy.

De film toont de grootstad in haar vooroorlogse schittering en de gapende wonden haar door de oorlog toegebracht, waarna de koortsachtige wederopbouw aan de beurt komt. De mooie Esperanto-film werd reeds in Nederland en in België vertoond. Bij haar eerste vertoning in Den Haag en in Brussel sprak Stefano Csurgai, Hongaars parlamentslid, een inleidend woord in het Esperanto.

MINISTER NAEGELEN OVER DE WENSELIJKHEID VAN EEN INTERNATIONALE TAAL.

Het «Journal Officiel» van 21 Augustus '47 bevat, zoals reeds gemeld, een uitvoerig antwoord van Z. Exc. dhr Naegelen, Minister van Onderwijs in Frankrijk, aan dhr L. Amat uit Toulon, die pleitte voor de invoering van Esperanto als leervak op de scholen. Twee eeuwen lang, zo schreef de Minister o.a., is het Frans de voorkeurstaal geweest van kunstenaars en diplomaten, maar de politieke verzwakking van ons land laat ons niet meer toe te hopen, dat de Angelsaksische volkeren ten voordele van het Frans er van af zullen zien, de eretiteln van hun gemeenzaame taal te doen gelden. Bij de behandeling van het Engels verklaarde de Minister o.a., dat invoering van het Engels als internationale taal aan de Engelssprekende volkeren een gevaarlijke suprematie zou geven op politiek, economisch en cultureel gebied. Het schijnt mij toe, aldus de Minister, dat we moeten terugkeren tot de idee van een kunsttaal. Inplaats van te trachten — en dikwijls dan nog tevergeefs — twee of drie vreemde talen op te verlaten, zou het intellectueel voor de meerderheid der kinderen veel voordeliger zijn één taal goed te leren, de hunne, en zich voor het overige tevreden te stellen met een hulptaal, waardoor zij zonder moeite in betrekking zouden kunnen komen met beschavingen, die dikwijls voor ons totaal gesloten blijven.

VERLOREN TIJD.

Wij lezen in de «Gool- en Eemlander» van 9.12.47: Vandaag gaat de derde week in van de Conferentie der grote Vier en nog altijd is er wezenlijk niets bereikt. Misschien zijn we te haastig gebakerd, want als verzachtende omstandigheid moet gezegd worden, dat er in plaats van twaalf maar vier dagen is vergaderd, omdat immers twee derden van de tijd verloren gaat met vertalingen...

LA STUDANTO

HET WERKWOORD (LA VERBO)

Vervolg

B. DE VERLEDEN TIJD (La estinta tempo aŭ preterito).

Het werkwoord staat in de verleden tijd, als de handeling plaats vond in een nu voorbije tijd, als: vanmorgen, gisteren, verleden maand, het vorig jaar. Vb.: Vader las de krant.

Daar de persoonlijke voornaamwoorden aanduiden wie de handeling verricht, en de voorbije tijd, wanneer ze geschiedt, kunnen we nu ook werkwoorden vervoegen in de verleden tijd.

Onbepaalde wijs: zijn, spelen, roepen.

Ik was, speelde, riep.

Gij waart, speelde, riept.

Hij, zij, het was, speelde, riep.

Wij waren, speelden, riepen.

Gij waart, speelde, riept.

Zij waren, speelden, riepen.

Als we de vervoeging van deze werkwoorden nagaan, bemerken we spoedig dat elk zijn eigen gang gaat: alle verschillen! En dat zijn amper drie werkwoorden uit de onafzienbare reeks! Ook wordt wel eens de draak gestoken met de onregelmatigheid van de vervoeging in de verleden tijd in het Nederlands, zoals blijkt uit een spotgedicht, waaruit hier graag enkele versjes worden overgedrukt:

«Bij roepen hoort: riep, maar bij snoepen, geen sniep.

Bij lopen hoort: liep, maar bij kopen, geen kiep.

En evenmin hoort er bij slopen: ik sliep.

Want dit is afkomstig van 't schone woord slapen;

Maar zet nu weer niet: ik riep bij 't woord rapen,

Want dat komt van roepen, en U ziet terstond,

Zo draaien we vrolijk in 'n cirkeltje rond!»

Wij, die van kindsbeen af met die tientallen varianten zijn vertrouwd, vinden die onregelmatigheid niet buitengewoon. Doch, wie als vreemdeling onze taal moet leren, aanziet de vervoeging van werkwoorden als *dopen, hopen, kopen, lopen* als een onoverkomelijke moeilijkheid. Zo ze in de onbepaalde wijs tot één soort schijnen te behoren, komt de ontgoocheling gauw opduiken: het is *doopte* en *hoopte*, doch niet *koopte* noch *loopte*. Moet het *kocht*, 't mag toch niet: docht, hocht, locht! Elst men *liep*, waarom niet *diep, hiep, kiep*?

En zo kan gemakkelijk gans deze rubriek daaraan besteed!

In Esperanto is de zaak ongelooflijk eenvoudig: de verleden tijd van het werkwoord wordt steeds gevormd, door achter de stam de uitgang «is» te plaatsen. Vb.:

La patro legis la ĵurnalon.

Die regel geldt voor alle personen van alle werkwoorden, ook voor deze met de meest onregelmatige vervoeging. Vb.: mi skribis, vi estis, li fumis, ŝi kudris, ĝi flugis, ni lernis, vi legis, ili kantis.

Aandacht!

Evenals bij de vervoeging in de tegenwoordige tijd, krijgt het *adjectief* de *meervoudsvorm j*, als het een werkwoord vergezelt, dat vervoegd is in de 1e, 2e en 3e persoon meervoud. Vb.: ni estis diligentaj, vi estis belaj; la infanoj (ili) estis bruemaj.

De verleden tijd wordt gebruikt om uit te drukken:

1) wat gebeurde, vóór het ogenblik, dat men spreekt. Vb.: Mi ricevis la revuon.

2) wat gewoonlijk gebeurde in het verleden, maar nu niet meer voorvalt. Vb.: Ho, la senzorga tempo: nek aŭtoj, nek bicikloj! La stratoj, la placo estis sendangeraj ludejoj!

C. DE TOEKOMENDE TIJD (La estonta tempo aŭ Futuro).

Het werkwoord staat in de toekomstige tijd, als de handeling plaats zal vinden op een toekomstig tijdstip, als: straks, morgen, de andere week, volgend jaar. Vb.: Vader zal de krant lezen.

Daar de persoonlijke voornaamwoorden aanduiden wie de handeling verricht, en het toekomstig tijdstip, wanneer ze geschiedt, kunnen we nu ook werkwoorden vervoegen in de toekomstige tijd.

Onbepaalde wijs: werken, schrijven, rusten.

Ik zal werken, schrijven, rusten.

Gij zult werken, schrijven, rusten.

Hij, zij, het zal werken, schrijven, rusten.

Wij zullen werken, schrijven, rusten.

Gij zult werken, schrijven, rusten.

Zij zullen werken, schrijven, rusten.

Deze vorm geldt voor alle werkwoorden in het Nederlands. We vormen dus de toekomstige tijd met behulp van het werkwoord *zullen*, dat daarom een *hulpwerkwoord* genoemd wordt. Feitelijk wordt het *hulpwerkwoord vervoegd*, terwijl het *gegeven werkwoord* in de onbepaalde wijs staat! Ja, het is nu eenmaal zó: de Nederlandse taal is geen op zich zelf bestaande toekomstige tijd rijk!

Esperanto wel! De toekomstige tijd van het werkwoord wordt steeds gevormd, door achter de stam de uitgang «os» te plaatsen. Vb.: La patro legos la ĵurnalon. Die regel geldt voor alle personen van alle werkwoorden. Vb.: mi skribos, vi estos li fumos, ŝi kudros, ĝi flugos, ni lernos, vi legos, ili kantos.

Aandacht!

Ook hier geldt de opmerking, aangeleerd bij de vorige twee tijden, betreffende het *adjectief*, dat een werkwoord vergezelt, vervoegd in de 1e, 2e en 3e persoon meervoud. Vb.: Ni estos bravaj.

De toekomstige tijd wordt gebruikt om uit te drukken:

1) wat gebeuren zal, na het ogenblik, dat men spreekt. Vb.: Mi ricevos la korektitan taskon.

2) wat men wenst, dat iemand doet. Vb.: Donu la revuon al via amiko kaj li interesigis pri ĝi.

Opmerking: Voor een handeling die nog geschiedt moet, bezigen we in het Nederlands ook wel de tegenwoordige tijd. Vb.: Morgen is het Maandag. — Daar spreken we straks over! — Het is klaar dat in Esperanto, ook in dergelijke gevallen, de *toekomstige tijd* dient gebruikt: de handeling heeft immers nu nog niet plaats. Dus: Morgaŭ estos lundo. — Poste ni parolos pri tio!

Samenvatting.

Nu kunnen we alle werkwoorden in Esperanto vervoegen, in de drie voornaamste tijden van de aantoonende wijs. Tegenwoordige tijd: vandaag: as; verleden tijd: gisteren: is; toekomstige tijd: morgen: os.

Bronnen: Tra la Labirinto de la Grammatiko (Faulhaber); Plena Grammatiko de E-o (Kalocsay — Waringhien).

OFENING 34 (10 punten).

Vertaal in Esperanto.

- 1) Vanavond begint de Esperanto-cursus; ik hoop dat er veel belangstellenden komen.
- 2) De hamster heeft wangzakken, die ze vult met graankorrels, erwten, bonen, om zo deze vruchten naar haar hol te brengen.
- 3) In de Middeleeuwen, mocht de lijfeigene niet naar een ander leen verhuizen, zonder de toestemming van de suzeren of van de vazal.
- 4) Zij leunde zich tegen de oude muur. Plots staat het spook vóór haar.
- 5) De laatste viooltjes geuren; weldra bloeien de tulpen.
- 6) Reeds drie jaar exploiteren zij een grote pachthoeve in Amerika.
- 7) Kom hier, Karel! Hier is geld en een brief. Je koopt een krant voor me, je post deze brief, en dan mag je gaan spelen.

In te zenden vóór 20-4-48, aan het adres: V.E.B., Postbus, 342, Brussel. Wie de verbeterde taak terugwenst, verzee zo vriendelijk een postzegel in te sluiten.

Verbetering oefening 33.

Overzetting in Esperanto.

Kaj kiam la nokto sternigas sur la silentan pejzaĝon, la onklo rakontas pri la surmonta vivo kaj pri ĉiaj strangaj spertoj, kiujn li travivis kun la grego. Poste ili vespermanĝas. Ili estas gajaj kaj kontentaj, kantas vesperan himnon, preĝas, kaj Palko voĉlegas por ili el sia libreto. Ĉiuj volonte aŭskultas lin. Kiam li silentas, ili aŭdas nur la krakadon de la fajro. Sur la ĉielo, la steloj briletas. La luno lumigas la monto-suprojn kaj la paŝtejojn. Foje kaj ree sonoras dolca sonorila tintado el la ŝafejoj... Kion alportos la morgaŭo?...

(El: Drie Kameraden, de Kristina Roy).

De Redactie Antwoordt.

Over Oefening 32 (Februari-nr.)

- 1) Nobelo (niet: nobelulo) demandis (niet: petis, want het gaat om een vraag, die een antwoord verlangt.)
- 2) Bij een niet-directe vraag hoort ĉu (noot se!); ĉu oni povas rajdi.
- 3) De edelman vraagt niet hoe de brug vroeger was, doch in welke staat ze nu is: de Nederlandse tekst — hoe wel correct — bracht menig «studanto» in de war. «Of de brug goed was», wordt: ĉu la ponto estas bona.
- 4) In de bijzin: «kiu kuŝas aŭ troviĝas antaŭ li» wordt het werkwoord in dezelfde tijd vervoegd als in de hoofdzin; dus «as».
- 5) Wegens de woordspeling moesten «bona», «gustumi» en «rajdi» gekozen worden, in de plaats resp. van: taŭga, provi (beproeven!), veturi.

Ĉu Zamenhof faris intencajn erarojn?

«Zamenhof ne estis diktatoro; do ninte siajn regulojn li mem tamen libere uzadis la lingvon, eĉ tiom libere, ke la leganto ofte demandis al si: ĉu Z. eble intence faris evidentajn erarojn por ne fortimigi tiujn, kiuj ne jam kutimas logike apliki la lingvon?»

Al tiu demando, kiun formulis G. J. Degenkamp en sia ĵurnalo *Skizo pri la evoluo de la lingvo literatura*, D-ro Manders jam respondis jene en *Nederlanda Katoliko* (Okt. 1947). «La evidentaj eraroj de Z. certe neniam estas intence faritaj, sed parte ili estas klarigeblaj el la troa rapidemo de Z., kiu ja estis tre okupita, parte ili estas simplaj naciismoj, apenaŭ kondamnindaj en la praepoko de nia lingvo». Kaj, ke la «logiko» de unu ne estas la logiko de alia, li pravas, aldonante, ke la Zamenhofu formo «la skribado leteron», kiun Degenkamp opinias «eble neintence uzata kaj nenatura», tamen el logika vidpunkto estas certe pravigebla: «ĝuste la esprimo «la skribado de letero» strange impresas al multaj neokcidentaj popoloj. La akuzativo en «rilate (koncerne) tiun libron», certe ne estas pli «natura» ol la akuzativo en «la skribado leteron».

Kiu kredus, ke Z. intence faris erarojn? Ĉu lia rolo de kreinto kaj profesoro ne postulis de li maksimuman atenton pri gustaj formoj en lingvo, kiu ne ankoraŭ estis plene ellaborita? Liaj maturaj lernantoj certe ne atendis de li tian sensencan! «Liaj unuaj disĉiploj», skribis Petro Stojan (Evoluo de Esperanto, kritik-historia skizo) estis pli malpli fervoraj lernantoj, plejofte ne spertaj, nekapablaj korekte, sen gramatikaj eraroj, skribi ordinaran leteron... «Estas facile al Z., kiu oferis dekadu jarojn da daŭra laboro prilingva, distingi inter bonaj kaj malbonaj kunmetaĵoj, klaraj kaj neklaraj parolturnoj. Sed estis nature neeble al liaj lernantoj-komentantoj, havi ĝustan posedon de la lingvo formiginta; ankoraŭ malpli — vere kontribui al la evoluo de la lingvo. Apud Z. estis du aŭ tri bonaj adeptoj, kiel Grabowski, kiuj ekposedis la lingvon, sed la ceteraj centoj tre malkorekte uzis ĝin, ofte nekonsciaj pri tiu fuŝado.»

Se nuna instruanto ne farus intencajn erarojn, kiuj nur povas kompromiti la bonan rezulton de lia kurso, despli prave, ni opinias, la «legdonanto» eĉ ne pensis pri tio. Li nur pensis pri la bono de la afero kaj la «eraroj, kiujn niaj okuloj nur kapablas rimarki post okulista flegado dum multaj jaroj kaj eĉ nun ni ne ĉiam estas klarvidaj.»

«Ĉion, kion mi de nun faros aŭ skribos», deklaris Z., mi ĝin ĉion faros jam kiel simpla privata amiko de la lingvo internacia, havante nek pli da kompetenteco, nek pli da moralaj aŭ materiaj privilegioj ol ĉiu alia... Tion postulas la intereso de la afero, kiu alie ne povus regule kaj rapide vastigi kaj ĉiam estus en dependo de unu persono kun liaj eraroj.»

Ne, erarojn Zamenhof ne intencis!

Tm.

- 6) Verklaarde de edelman: verduidelikte hij. Dus: klarigi. Hij legde immers geen verklaring af. Ook is «deklari» hier fout.
- 7) In Esperanto vermijdt men zoveel mogelijk het gebruik van samengestelde tijden. Hier mogen de vormen «estis parolinta» en «estas parolinta», door sommige gebruikt, vervangen worden door het eenvoudige «parolis».
- 8) Verder vragen: Demandi plu of plue, hoewel de e niet noodzakelijk is. De vorm «daŭrigi» is af te raden.

Aan S. P., Blankenberge: 1) Een landman is niet noodzakelijk een boer: terkulturisto is minder geschikt. - 2) Liefst het bijwoord vóór het werkwoord. - 3) De tweede maal «truen» in het enkelvoud. - 4) Trafluus (niet: ...etus). Toegekende punten: 8,5.

Aan V.E.B. Gent: 1) meti selon sur ĝin. - 2) Ho. - 3) Zie de algemene opmerkingen. Toegekende punten: 7.

De overige «studentoj» kregen hun taak met persoonlijke nota's terug.

RUSO PRI FLANDROJ

Malnova samideano Rusa, kiu preferus ne nomi sin, sed kiun la Redakcio bone konas, esprimas ĉi sube sian originalan kaj tre flatan opinion pri la Flandroj. Estus interese aŭdi voĉojn de alinaciuloj, ne-Flandroj, pri la vidpunkto de la Rusa samideano, kies pseŭda nomo estas: TURDO.

Eble nur maloftaj kleruloj konas la fakton ke dum la Mezepoko Flandrujo estis plej laborema kaj plej riĉa lando en Eŭropo, kies tiama ĉefurbo, Gent, tiutempe estis pli granda, pli loĝata ol Londono, Parizo, Romo!

Eble nemultaj scienculoj scias ke la unuaj homoj kiuj fondis kaj konstruis Nov-Jorkon estas Flandroj-Nederlandanoj en 17-a jarcento!

Male, ĉiuj pentroartistoj scias ke la ĝojiga olea kolor-pentrado fondiĝis en Flandrujo, lulilo de Van Eyck, Rubens, Van Dijk, Memling, Teniers k.m.a.!

Ne ĉiuj historiistoj konas la fakton ke la suda limo de la flandra popola teritorio estis tra Boulogne-Arras-Verdun!

La popol-denseco landa maksimumas en Flandrujo, kaj Antverpeno — apud Roterdamo — estas plej vast-aga mara haveno en Eŭropo.

La unua universala Esperanto-Kongreso estis en Bulonjo ne hazarde, sed kvazaŭ profetante ke la lasta kaj definitiva centro de la Mondlingvo estos en Bruselo, flandra ĉefurbo. Ja, Bulonjo siatempe estis flandra haveno!

Unuatempe, nia Movado floradis en Orienta Eŭropo. En 1900-1910 ĝi potencis en Parizo. En 1911-1931 en Genevo. La franc-lingvaj centroj tamen perdis sian Esperanto-gravecon... (pro familiaj cirkonstancoj: la belaj fraŭloj formangiĝis la kukojn de Sebert kaj de Hodler, bankrotigante la du «centrajn oficejojn»!)

Nun — ni esperu, provizore, — la centro loĝas en... vilaĝo apud Londono. Sed la fatala forto de la rondiranta civilizacio jam indikas la Malaltajn Landojn, la historiajn Nederlandojn (kiujn, amputitajn de sia sudo — nuna norda Francujo — en moderna jargono oni indikas per la epiteto: Beneluxo) kiel estontan hejmon por la centro de la Mondlingvo, kia ajn ĝi estos. Nun venis la historia momento, kiam la grandaj nacioj perdas sian moralan aŭtoritaton, bazas sin nur la brutala materia forto.

Do, la cirkonstancoj klare montras la nord-orientan direkton, laŭ kiu la iama Pariza mondlingva graveco translokiĝos eble al... Bruselo, urbo jam en 1890-1910 estinta centro de pluraj internaciaj institucioj.

Iom pala, anemieca lingvo, kiu unuigas nun la praktik-mondlingvanojn — t.e. nia Esperanto — bezonas pliriĉiĝi sian sangon, plivigliĝi sian korpon, ĉar nur «en sana korpo sanas la animo».

Ne ekzistas en Eŭropo nuna — iu alia popolo ol la flandra, kiu kapablas tiom potence kaj nature ŝpruci en Esperanton pluan sanforton, gojan vivecon!

Laboregante, ordema, paca, sana, gajema — flandra popolo — per la voĉo de siaj verkistoj, per la peniko de siaj artistoj — atingis maksimuman esprimon de la varma, svarma, bolanta vivo. Nenio dekadeca, pala, nenio angora, langvora, nenio futurista, narkotista... Ĉio natura, bonnutra, bondorma, lojale manlabora, gaje kanta, brue kaj ĝoje muzika, popolamasa, interfratiga... Jen — proksima paradizo por nia tutmonda centro, por la difinitiva kaj sana organizado de la Esperanto-Movado!

Turdo.



Ĝis la fino de januaro pasinta aliĝis 811 personoj el 25 landoj.

Por Belgio la partopreno estas facila, ĉar ili povas akiri sufiĉajn devizojn. Ili povas pagi en belga mono pere de Flandra Esperanto-Instituto en Brusel (1 sv.kr. = 12,50 bfr.) kiu peros ricevitajn pagojn kaj aliĝilojn.

Por helpi al interesatoj precize kalkuli la kostojn ni informas ke fervojbileto Brusel-Malmö-Brusel nun kostas triaklase 1524 bfr., duaklase 2330 bfr. Por la manĝoj en Malmö, kiujn oni mem prizorgu, oni kalkulu po persono kaj po tago (tri manĝoj) laŭ la kategorio: 6,50 — 12 sv.kr. + 10% por servmono.

Interesatoj por aviadila vojaĝo al Malmö petu informojn de nia Sano A. van de Velde, Buffelstr. 3, Gent.

Propagandu la U.K. mendante ĉe F.E.I. en Brusel la belajn trikolorajn kongresmarkojn. Ili kostas 4 bfr. por 15 pecoj (por etaj pagoj F.E.I. akceptas neuzitajn belgajn postmarkojn).

Petu aliĝilojn kaj ilustritajn esperantlingvajn prospektojn pri Svedlando al Flandra Esperanto-Instituto P. van Humbeekstr. 3, Brussel-West (p.k. 3258.51)

ESPERANTO-DICHTERS in vertaling

Niet lang vóór de oorlog verscheen een keur gedichten, «Dekdu Poetj», uit het werk van twaalf dichters, die in het letterkundig maandschrift «Literatura Mondo» debuteerden en waaronder de melancholische Hilda Dresen (1896) Estland vertegenwoordigt.

Het angstgevoel, dat in onderstaand gedicht «Vintra Luno» tot uiting komt, is des te aangrijpender, daar enige jaren later, haar in de Esperanto-wereld eveneens welbekende zuster Helmi het slachtoffer werd van het onmenselijk oorlogsgeweld.

WINTERMAAN

Hilda Dresen

Onnoemlijk schoon die maandoorglansde winternachten :
Bevroren zilvert sneeuw in 't maanlicht blauw gekleurd ;
Dê donkere appelbomen sluimer-rustig wachten,
Hun kreupele takken tot een stom gebed gebeurd.

Herinneringen zilverig langs de ziel verglijden,
Zacht-illuisterend aan het hart, als 't maanlicht mild en puur,
En van 't betoverend venster kan ik nauwlijks scheiden
Ondanks de slapentijd, ondanks het late uur.

Ook in de kamer glanst de maan door de gordijnen...
Hoe levenloos benauwend zijn de dingen hier :
De zetelkussens starend te verwijten schijnen
En bijna spokig schuift het maanlicht langs 't klavier.

Gewist zijn uit mijn ziel de mild'herinneringen :
Nu lijkt mij 't maanlicht kil, met doodsgevaar bezwaard,
En plots bevangt mij tussen levenloze dingen
Het angstgevoel als lag ik onder zwarte aard'.

(H. Vermuyten).

XIII-a KONGRESO FI.L.E. BLANKENBERGE Pentekoston 1948 (15-16-17 majon)

IV-a KOMUNIKO

Praktikaj Informoj

Kongresa Sekretariejo: 24, Malecotstr. Kongresa Kasisto: A. Pintelon, Baron Ruzettelaan 27, postkonto No 4726.76.

Kongreskotizoj: 60 Fr. Por membroj kaj Amikoj FI.L.E. kaj eksterlandanoj: 50 Fr.

La Kongreskomitato afable petas ke ĉiu tuj pagu la kotizon kaj tiel faciligu ĝian laboron, plenigu la aliĝilon kaj havigu la monon al la kasisto!

NIA EKSKURSO: ZWINLAND. DAMME. ZOUTE.

Iometo da historio. En la 5-a jarcento, vastaj inundoj glutis la flandran ebenaĵon, i.a. ankaŭ okcidente kaj norde de Brugge. Pro iom-post-ioma sablopleniĝo, insuloj elmergiĝis el la akvo, apartigitaj pro pli-malpli profundaj marbranĉoj. Sur unu el la plej gravaj de tiuj marbranĉoj: «het Zwin», riĉe ŝarĝitaj marŝipoj facile atingis Brugge, tiel starigante ĝian grandiozan ekonomian prosperon en la mezepoko.

Sed la sablopleniĝo senhalte etendiĝis, helpate de la bordanoj, kiuj konstruis digon post digo, tiom timante inundojn kiom dezirante reakiri ĉiam pli da tero el la maro.

En la 13-a jarcento, la maro jam ne etendiĝis trans Damme kie la ŝipoj do devis malsarĝi siajn varojn. Tiel ankaŭ Damme konis periodon de prospero.

Sed la maro senkompatate plue retiriĝis, pereigante Damme kiel havenurbon favore al Sluis, kiu en la 15-a jarcento siavice fariĝis la ĉefa haveno en Flandrujo. Tamen ĝi baldaŭ suferis la saman fatalon kiel Brugge kaj Damme.

Post kiam la bombardado de 1944 tiom difektis Sluis, DAMME fakte fariĝis la plej altira el la dezertaj Zwinland-urbetoj, kiuj iam en la mezepoko estis aktivaj, prosperaj marhavenoj. La belega urbdomo, la preĝejo kun sia impona turo, la hospitalo, la domo St Jan, ankoraŭ ĉiam atestas ĝian gloran pasintecon. Damme krome fieras pri tio, ke en la 13-a jarcento ĝi estis la restadejo de Jacob van Maerlant, la unua poeto en la flandralingva literaturo. Legendo asertas, ke Tjil Uilenspiegel, tiu petola ŝercemulo, ankaŭ vivis en Damme kaj estis enterigata tie.

Kio nuntempe nomiĝas ZWIN, estas nur dezerta sovaĝejo ĉe la nederlanda landlimo, kie iam la potenca marbranĉo enmarigiĝis. Sed somere alfluas promenantoj el la proksimaj banurboj por viziti la sablan ebenaĵon, la aluviaĵon kovritan de violkoloraj Zwin-floretoj, la fruktodonajn polderojn.

Tute apude kuŝas la juna, luksa, rava banurbeto ZOUTE, kiu harmonie kuniĝas la allogon de la strando kun la ĉarmo de freŝa verdajo, florplenaj ĝardenoj kaj gajaspekta somerdomo, dissemiataj laŭlonge de ombriĉaj aleoj.

Kiu ankoraŭ ne jam konatiĝis kun tiu pentrida feriejo, certe ne domaĝos la viziton.

F.C.

De pers over Esperanto.

Voor de eerste maal publiceert «Zondagochtend» Antwerpen, een Esperanto-kroniek;

— Op 1 Februari verscheen in ditzelfde weekblad het laatste artikel in de reeks «Licht over de wereldtaal». Op 22.2 een mededeling nopens een Esperanto-sprekende Film over Budapest. Het over de Nederlandse film en Esperanto «Volk» Gent, geeft twee berichtjes (27.2) en de dagelijkse uitzendingen der Franse Radio (12.2) ook «Het Laatste Nieuws» Brussel (26.2), «De Volksgazet» Antwerpen (26.2), de «Rode Vaan» Brussel (26.2) en de «Standaard» Brussel (26.2) publiceren het eerste berichtje terwijl het «Nieuws van de dag» (12.2) en de «Rode Vaan» Brussel (12.2) het tweede overgenomen hebben.

— «Nieuws van de dag» (12.2) evenals de «Nieuwe Gids» Brussel (20.2) en de «Rode Vaan» Brussel bespreken de film over Budapest.

— Het Weekblad «West-Vlaanderen» (20.2) handelt over F. Timmermans en het Esperanto, terwijl de «Beiaard» Brugge (27.2) een Esperanto-Kroniek publiceert.

— We telden, in 't totaal, 40 artikels, mededelingen of kronieken, waarvan 29 in Nederlandstalige en 11 in Franstalige bladen.

KOMUNIKOJ

7-a Internacia belga artsemaĵo

De 31.7 ĝis 8.8.48 la Ministerio de Publika Instruado organizas por en-kaj eksterlandanoj vizitojn, al la ĉefaj vidindaĵoj (el antikva, moderna, arta kaj historia vidpunktoj) de la gravaj urboj.

Tuta kostoprezio: 3.435 Fr. (kun 500 Fr. por persona uzo). Ĉio estas enalkulita: manĝoj, hotelo, aŭtobuso, enirprezoj, eĉ asekuro. Diversaj oficialaj akceptoj okazos; la semaĵo finiĝas en Brugge (ĉe la marbordo). Sciigu la deziratan lingvogrupon: ĝis nun nederlanda, franca, angla.

Adresu vin al: Prof. P. MONTFORT, Tervurenselaan 310, Wuluwe (Brussel) Belgio. (p.k. No 1302.91, tel. Brussel No 34.79.58.

Skribu kompreneble en Esperanto!

Leuven (Lovenjo)

La turisma fako komunikas ke, ĉe la 500-a datreveno de la ekkonstruo de la fama urbdomo, estos eldonataj broŝuro en E. pri la historio kaj folkloro, kaj krome, ankaŭ en E., flugfolioj.

Jen skizo de la programo: 3.4.48: akademika kunsido en la urba teatro kaj koncerto; 4.4.48: Religia ceremonio; de la 4-a ĝis la 28-a de aprilo ekspozicio pri verkoj kaj artaĵoj, rilataj al la urbdomo; 23.5.48: komerca reklamsekvantaro; 11.7.48: historia sekvantaro (temo: la ekkonstruo de la urbdomo); 11.9. granda kantato.

Dua komuniko sekvos. Direktu vin al: H. L. Boving, delegito UEA, Kapucienenvoer 104, Leuven.

Babilado

Kiel la liga kasisto, ankaŭ la Estraro dankas ĉiujn fidelajn membrojn: ĝi ĝojas pri la sufiĉe multnombraj nov-aliĝoj. Ni jam kapablas pristudi la membrostatistikon 1948, kvankam ĝi ne estas definitiva: ĝi ĉiukaze multe instruos al ni!

La perdoj: Izolulo — kiu do ne apartenas al sekcio, ofte tutsola Esperantopioniro en fora loko, estas ligata al la Ligo-centro nur per F. E. Tio neniel sufiĉas, precipe se tiu samideano Esperantiĝis nur post la milito, ekz. pro Radio-kurso. Ni klopodis kontakti per korespondado: por 30% ni sukcesis; ni serĉu grandan parton de la eksigintoj inter la 70% aliaj.

Gajno: Grandan meriton akiris la sekcioj: preskaŭ ĉiu kerno, oficiale akceptita, varbis novajn membrojn kaj samtempe plifortigis la lokan Esperanto-vivon.

Konsekvenca, ni ĉi-jare starigu novajn sekciojn kiuj bazos, kun la malnovaj kreskantaj kernoj, niajn estontajn grandskalajn planojn.

Ni bezonas financajn rimedojn por ke nia publika agado sukcesu. Tial necesas la aliĝo de senescepte ĉiuj samideanoj en Flandrujo: promesas ni ne seniluziigi ilin! Ni jam ne staras plu ekster la publika vivo: se kreskos la anaro, ĉiuj spertos la pli intensan laboradon de la Ligo-centro.

Ni petas sekciojn Antwerpen kaj Brusel sendi kiel eble plej baldaŭ membroliston 1948 al ni. Aliflanke, preskaŭ ĉiuj sekcioj ricevos indikojn pri membroj, kiuj loĝas en ilia urbo kaj eksigiĝis aŭ ne estis hejme kiam la poŝtkvitanco alvenis: la loka sekretario aŭ la propagandisto bonvole helpu ilian reanigon.

En antaŭa Babilado, kaj ankaŭ en Ligo-kunsido, ni instigas al pliaj aliĝoj de familiaj membroj. Nur kelkaj gesamideanoj komprenis la gravecon de tiu malgranda kontribuo. Bedaŭrinde, dekopu kiu lastjare komprenis ĝin, ŝajne nun perdis la memoron. Tamen, ni ree alvokas ĉiujn! La familiaj membroj ja pli grandigas la membronombron kaj ni substreke aldonu ke la statuto garantias avantaĝojn al ili, i.a. la pli favoran kongreskotizon.

Via sekretario, M.G.

La Liga Kasisto komunikas la aliĝon de nova subtenantino: F-ino Cornelis B., Aalst.

La Sekretario petas ke la sekcioj kaj reprezentantoj sendu, antaŭ la 20-a de aprilo 1948, eventualajn proponojn por la kongresa ĝenerala kunveno.

VERKO
kiu indas honorlokon en via biblioteko:

EDMOND PRIVAT
VIVO DE ZAMENHOF

FERDINAND HIRT & SOHN
LEIPZIG, ESPERANTO FAKO

Luksa eldono kun portreto de Zamenhof. Bindita: fr. 47
FRAGIEK EN TRIOMF VAN ZAMENHOF
la sama verko en nederlanda traduko de L. Belinfante-Ahn. Broŝurita: fr. 38.
Flandra Esperanto-Instituto
P. van Humbeekstr. 3, Brussel-W. (p.k. 3268.51)

Plaatselijk Nieuws

V.E.B. Afdeling Antwerpen — Op 1.3. 48, tijdens de *Varia Vespero*, bracht Dr. Van Gindertaelen een aangename verrassing: hij las een vertaling voor van het gekend sprookje van K. Van Buelen: « La plej belaj ĝemeloj en Hispanujo ». Op 8.3. werden liederen aangeleerd onder leiding van de voorzitter en, gedurende een half uurtje, een tekst vertaald. Op 15.3: kon de voorziene parolado van S-ano Jacobs niet doorgaan: zij werd uitgesteld op 19.4.48.

Voor April liggen in het vooruitzicht: Voordracht over *Denemarken*, Voorlezing door Dr. Van Gindertaelen, *Varia Vespero*.

V.E.B. Afdeling Brugge — Op 12.2 sprak dhr Pieters over PARIJS, « waarvan de stenen de geschiedenis als uitzweten », voor een talrijk Esperanto-publiek. Op 28.2 togen de Bruggelingen per « bus » naar *Oostende*, om er deel te nemen in het 5-de Esperanto-feest der afdeling aldaar. *Verda Stelo*, de Esperantist-Hypnotiseur, gaf er enkele van zijn puike nummers ten beste.

Op 4.3 werd o.m. het Kongres van *Blankenberge* besproken.

V.E.B. Afdeling Mechelen — Benevens de melding der gewone vergaderingen, tijdens dewelke de deelname in het XIII-de Congres, de werving van leden en Vrienden werden behandeld, kan medegedeeld dat het Examen voor de leerlingen van de Stadscurcus plaats greep op 17 Maart j.l.: er waren 11 deelnemers; er zal door het Stadsbestuur een officieel diploma worden afgeleverd aan diegene die geslaagd zijn.

Niaj Esperanto-Enigmoj kun premioj

PREMION gajnis post n-roj 35-36: S-ro R. Iserentant, el Brugge.

SOLVOJ.

N-ro 37. HORIZONTALA. 1. balad; akord. — 2. gramo. — 3. ilo; art. — 4. zon; gut; ren. — 5. orgio; okulo. — 7. plata; frapo. — 8. rok; kur; est. — 9. tir; apr. — 10. nesto. — 11. nokto; omaro.


VERTIKALE. 1. bluzo; prujn. — 2. orelo. — 3. ing; akt. — 4. agl; ist; inf. — 5. drogo; akreo. — 7. amato; frato. — 8 kor; kar; pom. — 9. tru; aer. — 10. elips. — 11. duono; otiso.

N-ro 38. Pro amo al la kandelo, kato lekas la kandeligon. (Prov. 771).

N-ro 39. KRUCVORTENIGMO.

HORIZONTALA. 1. tirano por virinoj (R); perej en la maro (R); malhelpi, ke iu pereu (R). — 3. ĝi troviĝas en ĵurnalo; fumanto ĝin faras (R). — 5. rezisti. — 7. eksfocigi; sufikso (R). — 9. frukto (R); li deĵoras ĉe la landlimo (R). — 11. enkasigi (R); ĝi restas post la falĉado (R).

VERTIKALE. 1. parto de kelkaj vestoj (R); fari libron (R). — 2. entuziasma amasa akcepto (R). — 3. doni respondon, esperante ke, sed ne sciante ĉu ĝi estos ĝusta (R); elmeti sin al danĝero (R). — 4. enuiga. — 5. plenumi sian servon (R); instrui beston (R). — 7. ĝi estas trovebla ĉe leono kaj ankaŭ ĉe aglo (R). — 8. bezonata (R); rado turniĝas ĉirkaŭ ĝi. — 9. trinkajo (R); prepozicio. — 10. vundita mano estas tia; ĉesigi ĉiun kontakton kun korpoj kondukantaj la elektron (R). — 11. dorneta arbo kun manĝeblaj fruktoj (R). — 12. fari, ke iu anĝu al grupo; oni diras, ke ĝi estas blinda (R).



N-ro 40. KRUCVORTENIGMO. (laŭ la krado de no 39.)

HORIZONTALA. 1. La napoleona estas fama (R); en ĝi sidas grajnoj (R); insekto (R). — 3. senmotive ŝanĝiĝema volo (R); ekstereŭropa lando (R). — 5. tute firma. — 7. duvorta titolo de verko esperanten tradukita; forte impresanta la sentumojn (R). — 9. birdo (R); la tradukinto de la ĉi-supra verko. — 11. malmola parto de la korpo; parto de korbo (R).

VERTIKALE. 1. larvo ŝpinas ĝin (R); forigi kutimon (R). — 2. kaŭzi malagrablecon pro troripetigo (R). — urĝa sciigo (R); raba besto kun ŝatata felo (R). — 4. oni uzas ĝin por fari kafon. — 5. kaŝe observi (R); maltrankviliĝi pro necerteco de io (R). — 7. io ne tuj klaras (R). — 8. birdo (R); mastro (R). — 9. sufikso (R); sufikso (R). — 10. el ĝi oni faras ŝnurojn (R); pro ĝi oni ofte ruĝiĝas (R). — 11. trinkajo. — 12. antaŭnomo de la ĉi-supra tradukinto; tion oni faras antaŭ ol meti leteron en koverton (R).

Sendu la solvojn sur aparta folio al POSTBUS 342. BRUSSEL, antaŭ la 20.4.48.

ANONCETOJ

Ĉiu vorto aŭ mallongigo: 0.75 bfr. Enpresigo kostas minimume 15 bfr. Unu int. respondkupono valoras 3 bfr.

POSTKARTOJN tre efikajn por la propagando kun bela desegnaĵo en verda preso sur delikata blanka kartono ĵus eldonis F.E.I. Prezo: 35 bfr por 100 ekz. (rabato de 20% al sekcioj kaj reprezentantoj de F.I.L.E.) Petu specimenon ĉe *Flandra Esperanto-Instituto*, P. van Humbeekstr. 3, Brussel-West.

ESPERANTISTAJ FILATELISTOJ ĉu vi jam posedas la ilustritan katalogon de oficialaj poŝtajoj kun Esperanto-teksto? Prezo: 7,50 bfr., ĉe F.E.I., Brussel.

Ekrilatu kun la tuta mondo, akiru ĉiumonate novajn E. filatelajn adresojn; tial sendu 100 diversajn uzitajn bonkvalitajn p.m. de via lando (aŭ novajn por 100 f.fr.) Por anonco necesas 150 p.m. Adreso: *Vasil Nikolov, Gorna Doumaia, Bulgarujo*.

Aperis plaĉa E. kalendaro 1948; prezo: unu respondkupono. Direkto vin al: Administracio de Esperanto, Osijek II., M. Stanivukoviĉa 4.I. Jugoslavio.



Postbus 342, Brussel
Leiding: Dr. T. Van Gindertaelen, (Mechelen). —
Redactieleden: Dr. F. Couwenberg (Blankenberge) — Drs. F. Roose (Brugge) — Drs. E. Symoens (Elisabethstad) — F. C. Ridwit (Antwerpen) — H. Vermuyten (Antwerpen) — E. Cortvriendt (Brussel) — Gr. Maertens (Brugge) — Verda. — F. Piot (Leuven).

Kopij: uiterlijk de 15-de van de maand bij de Redactie!

5.

Izolita malliberejanoj murfrappe intersignaladis, eĉ konversaciis. Vaguloj transis sur arboj, lignodometoj, fostoj, geometriajn uniojn por informi aŭ gvidi siajn postsekvantaj kamaradojn. Migrantaj metistoj grave & publike parolis inter si lingvon nekompreneban por aliaj. Herezuloj uzis metatorojn, fingrogestojn, ciferojn. Ural-sektoj, treege inteligentaj sovaguloj, satas vobrebusojn & gestolingvojn. Kaj, nature, la idoj de siaj patroj, ankaŭ la inianoj en ĉiuj urboj & vilaĝoj, uzis siajn publingvaĵojn, variantajn kun ĉiu nova generacio.

Lingvistiko jam montris ke en Okc.-Eŭropo uaj « sublingvoj » formiĝis precipe en mikslingvaj regionoj, sur trapasejo de migro-metistoj. Nu, la kusa Imperio entute estis tia mikslingva, nur pli vasta, do ankoraŭ pli favora por florado de artefaritaj interkompreniloj. En tio estas la kaŭzo de profunda diferenco inter la okc.-eŭropa kaj or.-eŭropa mondlingvaj movadoj. La unua estis pala ido de kabinetaj profesoroj, respektoplenaj antaŭ la internacia Latino. La dua estis vivoplena ido de la popolo mem, kiu kreadis, kaj ankoraŭ nun kreas, vivantaj lingvaĵojn por sia urĝa bezono. Zamenhof estis el la dua movado. Tial li estis pli forta per sia lingva sento ol la eruditoj de la okcidenta civilizacio. La popola, vivoplena instinkto nature superis la palan sciencon de intelektuloj.

FILOLOGIA INFLUO

La juna Zamenhof edukigis sub la influo de la lernejo & de la lerneja filologio, kiuj respegulis la epokon de la greko-latina klasikismo & de la mallerta Bopp-Pott-scienso. Tiu influo de la nove naskita lingvistiko estis nereakta. Versajne li neniam studis aŭtentikan lingvistikon; nur legis pri ĝi en popularaj artikoloj. Postuloj de *Bopp-Chavée & Schleicher* — adoptis simplecan teorion pri la lingva esenco, kaj provis rekonstrui komunan pra-eŭropan lingvon kun simpla strukturo. Zamenhof, sendepende, provis konstrui modernan komunan eŭropan lingvon kun simpla strukturo. Ideo & rimedo similaj. Unu el tiutempaj dogmoj estis la teorio pri abstraktaj pra-radikoj kun verba senco. Tiu dogmo influis al Esperanto, en kiu la iloj, produktoj, objektoj ofte devenas el verbo-radikoj: pafilo el pafi, tega el tegi, gravuro el gravuri. Tio estis herezaĵo el la « filozofia gramatiko », kiu floris en 18-a jarcento, kiam lingvistoj pli rezonadis ol observis, pli emis korekti la naturon ol kompreni ĝin reale.

Ke Esperanto baziĝis sur franca, germana, angla, greko-latina & iomete sur slava radikaro — pri tio oni multe skribis; sed la intima slava influo en la strukturo restas preskaŭ nekonata, pro la fakto ke okc.-eŭropaj eminentuloj ne scias slavajn lingvojn, nome la gramatikistoj: Cart, Fruictier, Aymonier, Grosjean-Maupin, Cox, Bailey, Esselin, Lippman, k.a. sin turnis en malvasta spaco de siaj lingvoj, kies tutmondan idean valoron ili trograndigis.

Kaŝata antipatio de la civilizitaj eŭropanoj kontraŭ la orientuloj, ankaŭ ludis sian decidigan rolon, malgraŭ la teoria respekto & nur fraza amo interpopola. El tio sekvis, en la jaroj 1906-1916, kvazaŭ sabotado & bojkotado de la zamenhofaj lingvo-ideoj, kiuj forte malplaĉis al la admirantoj de la Racine-a stilo.

Rusa lingvo prezidis en la eduko & lerneja studado de Zamenhof en Belostoko, Varsovio & Moskvo. La scio de tiu lingvo do necesas por seriozaj studentoj, kiuj celas akiri sendepandan komprenon pri la deveno & intima konstruo de nia lingvo. Ankoraŭ pli necesas tiu scio por vidi la lingvo-evolucion al ĝusta direkto, indikita de Zamenhof. La misero de nuna lingvostato, preskaŭ degenerado, rezultas grandparte el tio, ke dum lastaj 30 jaroj la sorto de Esperanto estis en manoj de ambiciuloj al kiuj mankis larĝa lingvo-kompreno. Se la korpo

DEVENO & VIVO

DE LA LINGVO ESPERANTO

originale verkis: Petro Stojan

(— radikaro, literaro) de Esperanto estas okc.-eŭropa, ĝia animo (— strukturo, ideesprimo) restas or.-eŭropa, eŭrazia, slava. Por ilia spirita avantaĝo, la Slavoj restis barbaraj logantoj en Eŭropo. Al ili do apartenas la merito konservi praajn formojn, arkaikajn vortojn & antikvajn pensmanierojn. Slava, latva, lituva, — jen tri lastaj lingvo-fideletoj, herecintoj de la primitiva hind-eŭropa idomo, kiu naskiĝis en vindujo.

Se Zamenhof tro profundigis en la eŭrazia spirito, la postaj gvidintoj facile kontentigis brili sur la ĝiata surfaco de la okcidenta formalismo. Ambaŭ deflankiĝis de la antikva hind-eŭropa mentaleco, kiu profunde penetris en popolvivon de Tibeto, Mongolio, Orient-Azio, pere de Budhismo & Zoroastra religio. La sama penetra influo estis en Sirio, Mezopotamio & Egipto.

La korelativa tabelo devenas ne el la greka — kiel imagis angla gramatikisto — sed el la slava, kie ĝi estas ankoraŭ pli rica: *koj, toj, nikakoj... kogda, togda, nikogda... kamo, tamo, nikamo... kad, tad, nikad... k.t.p.* Multaj strangaj kunmetaĵoj el la primitiva Esperanto estas nur mallerte tradukitaj slavaj vortoj: *centjaro* (jarcento), *sendito* (ambasadoro), *landaĵo* (lokestraro), *blankaĵo* (albumeno), *dezertulo* (ermito), *subbordo* (kajo), *enveturejo* (hotelo), *orajisto* (juvelisto), *sciigaĵo* (informa bulteno), k.m.a.

La intenco estis bona: per nemultaj radikoj esprimi ĉion, por eviti milojn da balastaj vortoj, tiom karaj al la Ido-adeptoj, kiaj estas ekz. iliaj: *arozar* (akvumi), *adherar* (aliĝi), *atraktar* (altiri), *muzelo* (buŝumo), *gratitudo* (dankemo), *universario* (datreveno)...

La intenco & principo de riĉa vortfarado el propra radikaro estis bona, sed — pro sia nesperteco — Zamenhof kreis neklarajn, dubencajn, rebuŝajn kunmetaĵojn, kiuj malplaĉis & forgesigis. Kial, ekz., la vorto « blankaĵo » devas & povas signifi albumenon? La vorto « blankaĵo » utilus nur en kunteksto, por sencij ion blankan, neĝon sur monto, ŝaŭman sur akvo, nubajon sur ĉielo, k.a. Zamenhof, kun 70 afiksoj, provis imiti la riĉan rusan vortkunmetadon, eblan pro la uzado de 300 afiksoj — prefiksoj & sufiksoj — kiuj vere permesas traduki 100.000 vortojn per 4.000 kombinitaj radikoj & afiksoj. Ĉi tie utilas konkreta ekz. Al la sola sufikso aj-, kiun posedas Esperanto, la rusa lingvo kontraŭmetas dekon da sufiksoj, kiuj pli precize esprimas diversajn aĵojn:

- belj* blanka lignaĵo, muko.
- beljo* blanka tolaĵo.
- beljmo* blanka makulo sur okulo, katarakto.
- belok* ova blankaĵo; neĝa montopinto.
- belkovina* albumeno.
- belovik* blanka fungo.
- belĉuga* blanka fiŝaro.
- belanka* blanka fungo, alia ol belovik.
- belous* narduso (bot.)
- belizna* blanka fiŝetaro.
- belilo* blanka farbo... k.m.a.

Por hom-vortoj Esperanto havas nur 6 sufiksojn: -al-estr-id-in-ist-ul. El ili nur unu kun ĝenerala senco: -ul-, kontraŭ 12 francaj & 12 rusaj sufiksoj: -ard-anda-aire-au-aud-in-on-ier-ur-ant-ois & -aka-ura-ec-avec-aĉ-ak-ik-nik-oj-an-un-lo.

Poste ni vidos, ke la ŝparemo en gramatiko, ke neŝufiĉa nombro da afiksoj, sekvigas en la vortaro neeblicn kunmeti klarajn vortojn & devigon akcepti multegajn

novajn radikojn, kontraŭ la principo de la sendependa vortotrezoro.

La unuforma uja sistemo estas precipe slava:

Allemagne	Deutschland	Niemcy	Germanija
Angleterre	England	Anglija	Anglija
Autriche	Oesterreich	Aŭstrja	Avstrija
Belgique	Belgien	Belĝa	Belĝia
Danemark	Dänemark	Danĵa	Danija
Espagne	Espanien	Hispanja	Ispanija
Finlande	Finland	Finlandja	Finlandia
France	Frankreich	Francja	Francija
Italie	Italien	Wiochy	Italija
Japon	Japan	Japonja	Japonia
Portugal	Portugal	Portugalia	Portugalia
Russie	Russland	Rosja	Rosija

-ie = 17% -ien = 25% -ja = 90% -ija = 100%

Ni vidas ke la form-reguleco landnoma kreskas de Okcidento al Oriento (: franca, germana, pola, rusa), kie ĝi atingas maksimumon, en Rusujo kun 100%. Pri la itala landnoma reguleco ni ne parolas, ĉar Zamenhof ne konsideris ĝin en sia laboro.

DUOBLA VIZAGO ESPERANTA

Junulo Zamenhof unue provis fabriki apriorian (libere elpensitan) lingvon. Post pluraj jaroj, ŝanĝante, li alvenis al posteriora sistemo bazita sur naciaj lingvoj. En tiu longa varia laborado, li ne ĉion detruadis transirante al nova sistemo: en ĉiu plua verkaĵo li konserveme lasis iomete el la antaŭa. Atenta esploro de la unuaj liaj libroj tion montras. Kiel patro li amis siajn ideo-idojn, kaj nevolonte forlasadis ilin, eĉ kiam ĉiuj motivoj ŝajne pledis kontraŭ ili. En la aboco li estis revolucianto, forlasante la internaciajn literojn q, x, y, w sen kiuj oni ne povas skribi pri matematiko, kemio, maraferoj, geografio, turismo, komercio, filatelio, k.a. Kun malrespekto por la oficiala filologio, kiu jam posedis supersignitajn literojn, li kreis tute novajn, neniam antaŭe viditajn literojn: ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ.

Sed en la radikaro, male, li estis konservemulo, troobea al la klasikaj greko-latinaj formoj, ne plu valoraj por la moderna nacia vivo. La vortoj: *historia, homo, sanctus, fructus, cubitus,...* montriĝis nebonaj por la nova popoloj, Italioj, Hispanoj, Francoj, kiuj skribas aŭ diras *istoria, omo, santa, fruto, kudo,...* (mi donas mezajn formojn), kaj eĉ ĉiuj slavaj & rusoj diras « istorija ». La litero & sono h- (komenca) estas kondamnita per la dumiljara tutmonda evoluo. Eble pro nesufiĉa tempo, Zamenhof adoptis multajn greko-latinajn vortojn, nekonatajn de publiko, kiuj tamen povus esti internacie tradukitaj:

- skolopo* = bekaso, bekaseno, bekaco, k.t.p.
- koturno* = kuajo, kŭalio,...
- kruro* = gambo, jambo, lengo,...
- meleagro* = hindokoko, dindo, indikoko.
- zingibro* = gingo, imbero.
- urogalo* = urkoko, tetraego.

Principe, la adoptita radikaro baziĝis sur la pluraj naciaj lingvoj. Sed, praktike, enŝoviĝis formoj solaciaj, aŭ mallarĝe naciaj malgraŭ formoj internaciaj, komunaj por multaj lingvoj. *Bird* estas malpli internacia ol *avi, hund* ol *dog, kyn; ŝton* ol *ston, sten; ŝultr* ol *epol, ĉeval* ol *kaval* aŭ *kabal, ŝuld* ol *deb, plaĉ* ol *plez*. En tiaj kazoj Zamenhof verŝajne konscie & intence adoptis la angla-germana radikojn por ne fari sian lingvon tro romano-latina; pro la sama « justeca » motivo li aldonis (— nenecese) iom da slav-radikoj. Jen ankoraŭ kelkaj vortoj latinaj, kun enkrampaj internaciaj radikoj: *anser* (gans), *dolor* (dol), *meleagr* (dind), *juglando* (valnukso), *umbilik* (nomb aŭ nab), *urogal* (urkok), *trankvila* (koja, kvieta, kalma), *singulti* (iki).

(Daŭrigota)

Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantisten-Bond, Postbus 342, Brussel. — Drukkerij: J. Van Laer, Oude Vaartstraat 110, Turnhout.